

EL SCIENCOJ

INTERESAJ
KAJ/AŬ GRAVAJ
NOVAĴOJ

BALAA ELEKTRONIKA MIKROSKOPO KUN ALTA DISTINGA POVO

Sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la laboristoj, teknikistoj kaj sciencistoj de la Pekina Fabriko de Sciencaj instrumentoj sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, disvolvante spiriton de memstareco kaj sinapogo sur la propraj fortoj, sukcesis mem projekti kaj konstrui balaan elektronikan mikroskopon kun alta distinga povo el enlande produktitaj materialoj. La kvalito de la mikroskopo estas konstatita kontentiga kun distinga povo por 100 Å, kontinue reguligebla pligrandiga kapablo de 20-oblo ĝis centmiloblo kaj kompare forta sentigo de reliefo de la bildo. Ĝi estas nun jam produktata pokvante.

(El "Popola Ĉinio", n-ro 1, 1976.)

PRI LA VIVLONGO DE LEEUWENHOEK

La inventisto de la mikroskopo, Antoni van Leeuwenhoek ne "vivis pli ol 150 jarojn", sed 91 jarojn (1632-1723).

Referencoj: franca vortaro Larousse; Histoire des Sciences de Maurice Daumas; Mikroskopion, revuo eldonata de la svisa mikroskopfabriko Wild.

(Pri la neĝusta aserto en la artikolo el Sc. Revuo n-ro 112, p.77, atentigis nin leganto kies nomon bedaŭrinde ni ne notis. Koran dankon! - Red.)